


lernu!

Anna Löwenstein

La teorio Nakamura

Dua eldono



Anna Löwenstein

La teorio Nakamura

(Dua eldono)

La baza rakonto, sur kiu baziĝas
la ĉefa kurso de Esperanto de *lernu!*
La reta versio kun multaj ekzercoj
kaj aldonaj tekstoj troveblas ĉe

www.lernu.net

© lernu.net

La teorio Nakamura

Aŭtoro: Anna Löwenstein

Grafika aspekto: *lernu!*

Kopirajto: lernu.net

Enhavo

Kio estas tio?	5
Mi estas vi.....	6
Ĉu tio eblas?	8
Mi ne kredas!.....	10
Ek!	12
Surprizoj.....	14
Kia ĝojo!	16
Embaraso	20
Frenezaj hararoj.....	24
Urbo sen aŭtomobiloj.....	28
En kinejo	32
Kie manĝi?	35
Viando el fabriko	38
Tasoj de IKEA	41
Kiu estas Lunjo?.....	44
Rerenkontiĝo.....	47
La ĉarmo de la 20a jarcento	51
Malsano.....	55
Sandviĉo kun ovo	60
La teorio Nakamura.....	65
Nedezirata konsilo	68
Lunjo.....	72
Kafo kun lakto.....	76
Tro rapida semajno	79
Malfacila klarigo.....	83
La lasta programero.....	86

Kio estas tio?

Filipo sidas en ĉambro. En la ĉambro estas tablo, seĝo, lito, vesto-ŝranko kaj libro-breto. Gitaro kuŝas sur la lito. Sur la muro estas bela afiŝo pri koncerto. La ĉambro estas en studenta loĝejo. Ĝi estas bela kaj moderna, sed malgranda kaj ne tre pura.



Sur la tablo estas komputilo. La komputilo estas tre granda. La jaro estas 1982 (mil naŭcent okdek du).

En la ĉambro estas stranga bruoj. Stranga bruoj kaj stranga lumoj. Kio okazas?

Aperas en la ĉambro granda ŝranko. Kio okazas? Kio estas tio?

Mi estas vi

Filipo rigardas. Li krias. Li timas.



Viro venas el la ŝranko. “Saluton, Filipino,” li diras.

Filipo timas. “Kiu vi estas?”

La viro diras, “Mi estas Filipino Nakamura.”

Filipo krias, “Sed tio ne eblas. Mi estas Filipino Nakamura!”



La viro diras, “Jes, vi estas Filipino Nakamura. Sed ankaŭ mi estas Filipino Nakamura. Ni estas Filipino Nakamura. Mi estas vi. Mi venas el la jaro 2012 (du mil dek du).”

Filipo svenas.

Ĉu tio eblas?

“Filipo! Filipo!” La maljuna Filipo parolas al la juna Filipo. “Ĉu vi estas en ordo?”

La juna Filipo kuŝas sur la planko. “Ne, mi ne estas en ordo. Mi estas freneza. Kiu vi estas?”

“Vi ne estas freneza. Mi estas vi mem. El la jaro 2012.”



La juna Filipo estas alta kaj maldika.

Ankaŭ la maljuna Filipo estas alta, sed li estas iom pli dika,

kun grizaj haroj kaj malgranda griza barbo.

Estas laŭta bruoj. La bruoj venas de la granda ŝranko, kiu staras en la ĉambro. La junulo demandas, “Kio estas tio?”

“Tio estas tempo-maŝino. Ĝi vojaĝas tra la tempo.”

“Sed tio ne eblas!” diras la junulo.

“Jes, tio eblas. Mi venas el la jaro 2012. Nun, en 1982, vi estas studento pri fiziko. Sed post tridek jaroj vi estos fama fizikisto kaj esploristo.”

Mi ne kredas!

En la poŝo de la maljuna Filipino estas monujo. En la monujo estas mon-biletoj kaj moneroj.

La maljunulo diras, “Jen moneroj. Ili estas moneroj el la jaro 2012.”



Filipo rigardas. “Tiuĵ moneroj estas strangaj. El kiu lando ili estas?”

“Ili estas eŭropaj moneroj. Ili estas eŭroj.”

“Eŭro. Kio estas tio?”

“Eŭro estos la eŭropa mono en la jaro 2012. Vi vivas en 1982.

Nun, en 1982, la germana mono estas la marko. La franca mono estas la franko. La itala mono estas la liro. Sed post tridek jaroj, en Germanujo, Francujo kaj Italujo la mono estas la eŭro.”

“Mi ne kredas!”

La maljunulo diras al la junulo, “Jen revuo. La dato estas 2012.”



La junulo rigardas. “Kiu estas tiu?”

“Tiu estas la prezidanto de Usono.”

“Sed li estas nigra!”

“Jes, la nuna prezidanto de Usono estas nigrulo.”

“Sed tio ne eblas!”

La maljuna Filipino ridas.

Ek!

La du Filipinoj parolas. “Kia estos la mondo en 2012?” la pli juna Filipino demandas. “Ĉu via tempo-maŝino povas porti du homojn? Ĉu ankaŭ mi povas vojaĝi en ĝi?”



La maljunulo respondas, “La tempo-maŝino ne estas mia, sed nia. Jes, ankaŭ vi povas vojaĝi en ĝi. Sed la jaro 2012 estas tro proksima. Ne estas bona ideo, vidi kia estos via propra vivo post nur tridek jaroj. Ni devas iri al pli malproksima jaro.”

“Kia estos la mondo post ducent jaroj? Ĉu ni povas vojaĝi al tiu tempo?”

“Tio estas pli bona ideo,” diras Filipo. Li malfermas la pordon de la tempo-maŝino, kaj la du Filipoj en-iras.

La interno de la tempo-maŝino estas tre simpla. Ŝajnas al la juna Filipo, ke ili staras en ŝranko. La spaco estas mallarĝa. Ne estas lokoj por sidi. Apenaŭ estas eĉ spaco por du homoj.

“En filmoj, la interno de tempo-maŝino ne estas tia,” la junulo diras. “Nur kvar muroj kaj unu ekranon! En la filmoj estas multaj komputiloj kaj ekranoj.”

“Mi ne bezonas ilin,” lia pli maljuna memo diras al li. “Mi vojaĝas sola, do mi bezonas nur unu ekranon. Mi eĉ ne bezonas klavaron, ĉar la komputilo akceptas parolajn komandojn. La vojaĝo estos tre rapida, do ni ne bezonos sidlokojn.”

Li iras al la komputilo, kaj diras komandon. Bildo aperas en la ekranon.

“Jen!” li diras. “Ni iros al la jaro 2182. Ek!”

Surprizoj

Filipo sentas fortan premon ĉe la brusto. La premo estas forta, tre forta, tro forta. Li aŭdas bruon en la oreloj: laŭtan bruon, tre laŭtan, tro laŭtan. En liaj okuloj estas stranga lumo... La premo ĉesas, la bruo ĉesas, la lumo malaperas.

“Ni estas en la jaro 2182,” diras la maljunulo. “Mi malfermos la pordon.” Li diras komandon al la komputilo.



La du Filipinoj vidas ĉambrom. Sed en la ĉambro ili vidas strangan scenon. Ili vidas kamparan scenon kun multaj homoj. La homoj iras tra la kamparo, parolas, gestas kaj krias.

Ĉe unu flanko de la ĉambro, juna virino sidas sur seĝo kaj rigardas la scenon. Ŝiaj haroj estas bluaj.

La junulino vidas la tempo-maŝinon. Ŝi saltas el la seĝo. Ŝi diras komandon, kaj la tuta sceno malaperas.

Sed ne tio surprizas la junan Filipon. Eĉ ŝiaj bluaj haroj ne surprizas lin. Surprizas lin nur la vesto de la virino. Ŝi portas veston, kiu kovras ŝian tutan korpon. Ĝi kovras ŝiajn brakojn, ŝiajn krurojn, eĉ ŝiajn piedojn. La vesto ne estas larĝa, sed sekvas la formon de ŝia korpo. Sed eĉ tio ne estas la plej granda surprizo por la junulo. Tra la vesto li vidas ŝian tutan korpon. Ŝia vesto estas travidebla.

Kia ĝojo!

La junulino rigardas la du Filipinojn. “Kiu vi estas?” ŝi krias laŭte. “Kiel vi eniris mian ĉambron? Kiel vi ek-havis mian tempo-maŝinon?”



“Heleno!” diras la maljuna Filipino. Lia voĉo estas emocia. “Tre longe mi atendas ĉi tiun momenton! Kia ĝojo re-vidi vin!”

“Kiu vi estas? Mi ne konas vin. Kiel vi scias mian nomon?” la junulino demandas.

“Vi ne konas min, sed mi konas vin. Mi scias vian nomon, ĉar mi renkontis vin antaŭe. Mi venis al ĉi tiu ĉambro en la

tempo-maŝino antaŭ tridek jaroj.”

Li rigardas al la juna Filipino, sed lia pli juna memo nur aŭskultas sen-komprene. “Mi estas via antaŭ-ulo. Mi estas via pra-pra-pra-pra-avo Filipino Nakamura. Same kiel ĉi tiu junulo. Ni vojaĝis al vi kune en nia tempo-maŝino.”



“Ĉu vere vi estas Filipino Nakamura, la fama fizikisto? Ankaŭ mi estas studento pri fiziko. Ĉe la universitato mi studas vian teorion pri tempo. Mia familio ankoraŭ havas vian tempo-maŝinon, kiun vi konstruis antaŭ ducent jaroj.”

“Mi ĝojas ek-scii, ke post ducent jaroj, oni ankoraŭ studos mian teorion. Jes, mi estas fizikisto, kaj ankaŭ via antaŭulo.

Ankaŭ ĉi tiu junulo havas la saman nomon kiel mi. Li estas mia pli juna memo. Ni estas la sama homo.”



La pli juna Filipino aŭskultas, sed li ne komprenas. “Kion vi diras? Kiun lingvon vi parolas: ĉu la hispanan? Mi ne komprenas ĝin.”

“Ĉu vi povas paroli alian lingvon?” la maljunulo demandas Helenon. “Mia pli juna memo ne komprenas Esperanton.”

“En ordo,” ŝi diras angle. “Ĉu vi parolas la anglan?”

Ŝia elparolo estas stranga, sed la du Filipinoj komprenas ŝin.

“Saluton,” ŝi diras angle al la juna Filipino. “Mia nomo estas Heleno. Mi estas via pra-pra-pra-pra-nepino. Nun ni estas en la jaro 2182, kaj vi staras en mia ĉambro ĉe la Universitato de Kembriĝo en Anglujo.”

La junulo rigardas la ĉambron kun surprizo.

“Ĉu ĉe la Universitato de Kembriĝo? Sed ankaŭ mi studas en Kembriĝo!”


“Kompreneble,” diras la pli aĝa Filipino. “Ni estas ankoraŭ en via ĉambro. La jaro estas malsama, sed ni restis en la sama loko.”

La junulo rigardas la ĉambron, sed li ne rekonas ĝin. Sur la muroj estas bildoj, sed ili estas lumaj kaj brilaj kiel komputilaj ekranoj. Sur unu muro estas ankaŭ longa spegulo... aŭ ĉu ĝi estas ekrano? Estas du brak-seĝoj, tre grandaj, kun altaj dorsoj kaj apogiloj por la piedoj. La ĉambro estas sen tablo. Estas bretoj kun multaj nerekoneblaj objektoj: ĉu ili estas vazoj? Filipino rigardas ilin sci-vole.

“Nun,” Heleno diras, “kompreneble vi volas vidi, kia estas la ekstera mondo, ĉu ne? Sed vi ne povas iri tra la stratoj en tiel malmodernaj vestoj. Unue vi devas ŝanĝi viajn vestojn.”

Embaraso

Heleno parolas kun la du Filipoj. (Ni nomos ilin Filipego kaj Filipeto.) “Vi ne povas iri tra la stratoj en tiel malmodernaj vestoj. Unue vi devas ŝanĝi viajn vestojn.”



“Kiel ni povas fari tion?” demandas la juna Filipo, Filipeto.
“Ĉi tiel,” ŝi respondas. “Staru antaŭ la ekrano, mi petas.”

“Kie estas la ekrano?” Filipeto demandas.

“Tie.” Heleno montras al la spegulo. “Unue vi devos de-meti viajn proprajn vestojn.”

“Ĉu vere?” diras Filipeto kun embaraso.

“Ĉu tio estas embarasa por vi?” Heleno diras. “Mi scias, ke en via mondo de la 20a jarcento, la homoj ne volis montri la sen-vestan korpon. Sed ĉi tie, tio estas normala.”

“Tamen, por junulo tio estas embarasa,” diras la maljunulo, Filipego. “Mi faros unue.”

Filipego staras sen vestoj antaŭ la longa ekrano. La ekrano estas ankaŭ spegulo, kaj aperas tie lia bildo. Heleno diras komandon, kaj subite sur lia korpo en la ekrano aperas travidebla plasta vesto kiel tiu de Heleno. Ĝi kovras lian tutan korpon de la piedoj ĝis la kolo.


Heleno rigardas la junan Filipon. “Nun ankaŭ vi bezonas veston de la 22a jarcento. Demetu viajn proprajn vestojn, mi petas, kaj staru antaŭ la ekrano.”

“Tamen mi tenos mian kalsonon,” diras Filipeto.

Denove Heleno diras komandon, kaj sur la ekrana bildo de Filipeto subite aperas plasta vesto. “Kie estas via klavaro?” Filipeto demandas. “Ĉu en la 22a jarcento oni ne plu bezonas klavaron? Ĉu vi uzas nur voĉajn komandojn?”

“Kio estas klavaro?” Heleno demandas. “Ho, ĉu tiu malnova ilo kun la alfabeto, kiun oni vidas en muzeoj? Oni ĉesis uzi tion antaŭ longega tempo: eble antaŭ unu aŭ du jarcentoj.”

Ŝi iras al la mur-ekrano, kaj malfermas ĝin kiel pordon. Malantaŭ ĝi estas ŝranketo kun kelkaj bretoj.




“Jen viaj vestoj,” ŝi diras.

“Ĉu tiel rapide?” diras Filipeto kun surprizo. “Ne nur rapide: rapidege!”

La du Filipoj prenas la vestojn de Heleno, kaj rigardas ilin iom dube. Ili estas el plasto, kaj same kiel ŝia vesto, ili estas tute trasideblaj. La vesto de Filipeto estas blua, kaj tiu de Filipego estas flava. Ili estas tute el unu peco. Oni eĉ ne bezonas ŝuojn, ĉar ili kovras ankaŭ la piedojn. La suba parto estas kiel pantolono, kiu tre precize kovras la piedojn, la krurojn, la postajon (kaj ankaŭ la antaŭajon!) kaj la koksojn. La supra parto estas kiel ĉemizo, kiu kovras la bruston, la brakojn, la mamojn (se oni estas virino), ĝis la kolo. La plasto estas komforta kaj mola, kiel mola ŝtofo.

Frenezaj hararoj

“Ni devas ŝanĝi ankaŭ viajn hararojn,” Heleno diras. “Staru denove antaŭ la ekrano.”



Filipeto staras antaŭ la ekrano, kaj rigardas, dum lia hararo longiĝas, mallongiĝas, bluiĝas, verdiĝas. “Ĉu tiel aŭ ĉi tiel?” diras Heleno.

Filipeto ne scias, kion respondi, sed ŝi tuj diras, “Mi ŝatas la verdan hararon kun la blua vesto. Ni konservu ĝin.” Ŝi diras komandon, kaj subite la hararo de Filipeto (la vera Filipeto, ne tiu en la ekrano) mallongiĝas kaj verdiĝas. “Bele!” ŝi diras.

“Mi tenos mian propran hararon,” Filipego diras. “Mi ne volas tian frenezan koloron.”



Sed Heleno respondas, “Mi scias, ke en la 21a jarcento la maljunuloj griziĝis, sed ne en la 22a. Kial vi volas teni vian grizan hararon?”

“Nu...” diras Filipego. “Ne plaĉas al mi violkolora hararo, aŭ oranĝkolora. Donu al mi normalan koloron: brunigu miajn harojn, aŭ nigrigu ilin, sed ne flavigu aŭ ruĝigu!”

Li staras antaŭ la ekrano kaj rigardas, dum ankaŭ lia hararo longiĝas, mallongiĝas, nigriĝas, bruniĝas... “Jen!” li krias. “Jen la koloro, kiun mi volas.”

“Mi konservos ĝin,” Heleno diras. “Jen via nova bruna hararo. Ho! Kiel vi rejuniĝis! Via nova hararo rejunigas vin!”

Filipego rigardas al la ekrano kaj ridetas kontente. “Nun mi estas preta por vidi la mondon de la 22a jarcento.”

Filipeto diras, “Vi ŝanĝis la koloron de mia hararo rekte sur mia kapo. Sed kial vi ne povis ŝanĝi miajn vestojn rekte sur mia korpo? Kial necesis preni ilin el la ŝranko malantaŭ la ekrano?”

“Ĉar...” Heleno diras. “Ĉar... ho, mi ne havas tempon por klarigi nun. Ĉu vi ne volas vidi la eksteran mondon? Ni iru per lifto al la ter-etaĝo.”

Ili staras en la koridoro ekster la ĉambro. La lifto jam estas tie; en la 22a jarcento ne necesas atendi. Ili eniras. “Kial ne estas butonoj?” demandas Filipeto.

“Al la ter-etaĝo,” Heleno diras laŭte kaj klare, kaj la lifto tuj portas ilin al la suba etaĝo.

Ekstere, la tago estas varmega kun forta suno. “Ĉu vere ni estas ankoraŭ en Anglujo?” Filipego demandas. “La vetero ŝajnas afrika. Kial la vetero estas tiel varmega?”



“Ĉar dum la 21a jarcento la mondo multe varmiĝis,” Heleno diras. “Ĉu via vesto estas tro peza? Vi povas malpezigi ĝin. Ĉu vi vidas la butonon tie ĉe via brako? Nur tuŝu tion kaj diru klare: *malpeziĝu*.”

“Ĉu eblas tiel ŝanĝi ankaŭ ĝian koloron?” Filipeto demandas.

“Kompreneble.”

Urbo sen aŭtomobiloj

Estas tre varme, sed la du Filipinoj sentas agrablan malvarmeton en siaj plastaj vestoj. La vetero estas afrika, sed al iliaj okuloj la homoj en la strato ŝajnas sud-amerikanoj. Kelkaj estas blankaj, aliaj nigraj, sed la plejmulto estas ie inter tiuj du ekstremoj, helbrunaj aŭ malhelbrunaj. Iliaj hararoj estas de ĉiaj koloroj. Sub siaj plastaj vestoj, ĉiuj estas nudaj.



Neniu interesiĝas pri la du Filipoj, aŭ preskaŭ neniu. Iuj ja rigardas. Virino preterpasas kun du malgrandaj infanoj. La geknaboj krias, kaj montras al la kalsono de Filipeto, kiu estas videbla sub lia plasta vesto. Ili diras ion al sia patrino. La elparolo de la angla sufiĉe ŝanĝiĝis dum la lastaj ducent jaroj, sed Filipeto komprenas iliajn vortojn. “Panjo, kio estas tio?”

“Ŝŝŝ, silentu,” diras ilia patrino. “Paroli pri aliaj homoj estas malĝentile.”

Filipeto ruĝiĝas. Li bedaŭras, ke li ne demetis sian kalsonon, same kiel ĉiuj aliaj homoj, kiuj iras senembarase laŭ la vojo.



Inter la konstruaĵoj estas larĝaj vojoj, sen trotuaroj. Estas herbejoj kaj arboj. Sub la arboj estas benkoj por sidi, kaj jen kaj jen vidiĝas rivereto aŭ fontano. Laŭ la muroj de la domoj

kreskas herbo kaj floroj, kaj sur la plataj tegmentoj estas ĝardenoj. “Kie estas la aŭtomobiloj?” Filipeto demandas. “Mi vidas multajn biciklojn, sed neniujn aŭtomobilojn.”

“Kio estas aŭtomobilo?” demandas Heleno. Ŝi pensas dum momento. “Ho jes, aŭtomobilo estas tiu malnova veturilo, kiun oni vidas en muzeoj. Ĝi estis malbona: tro malpura, tro brua, tro danĝera. Kiam la homoj veturis per aŭtomobiloj, ili malpurigis la aeron kaj kaŭzis multajn aliajn problemojn. Nun ĉiuj uzas nur biciklojn aŭ sub-terajn vagonojn.”

Jen kaj jen sur la herbejo estas malgrandaj konstruaĵoj.

“Jen la enirejo de la subtera fervojo,” Heleno diras. La pordo de la lifto tuj malfermiĝas kaj la tri eniras.

“Ĉu ĉi tie neniam necesas atendi lifton?” Filipego demandas.

“Foje. Kiam ĝi rompiĝas.”

La pordo denove malfermiĝas, kaj la tri eliras el la lifto. La du Filipoj rigardas ĉirkaŭ si kun intereso. “Ĉu vere ni estas sub la tero?” Filipego demandas. “Super ni estas la ĉielo!”

“Tio ne estas vera ĉielo,” Heleno klarigas. “Ĝi estas lum-plafono. Eĉ nokte ĝi brilas, same kiel tage. Ĉi tie neniam mallumiĝas. Sed ne ĉiuj ŝatas tion; iuj preferas vidi nigran plafonon kun steloj, kiel la vera ĉielo ekstere. Ha, jen la vagono.”

Vitraj pordoj malfermiĝas, kaj antaŭ ili estas malgranda vagono kun ok sidlokoj. Ili eniras kun du aliaj homoj. Unu el la homoj estas flavharulino, kiu scivole rigardas la kalsonon de Filipeto sub lia vesto. Tiam ŝi ruĝiĝas. Ŝi rapide prenas ekraneton el sia sako kaj eklegas.



Sur la muro estas mapo kun nomoj de la haltejoj de la vagono. La du Filipinoj rekonas la nomojn de multaj stratoj kaj placoj, ĉar eĉ post ducent jaroj la nomoj ne ŝanĝiĝis. Heleno tuŝas unu el la nomoj, por ke la vagono haltu ĉe tiu haltejo.

“Ĉi tie ni eliros,” ŝi diras. “Ĉu vi venos kun mi al la kinejo?”

En kinejo

Heleno kaj la du Filipinoj staras ekster la kinejo. “Kioma horo estas?” Heleno diras. Ŝi rigardas sian man-artikon. Tie ŝi portas ian objekton, kiu similas grandan kvadratan horloĝon. “Dudek post la sesa,” ŝi diras. “Ni devas rapidi. Restas al ni nur dek minutoj. La filmo komenciĝos je la sesa kaj duono.”




La kinejo havas larĝan enirejon el brila vitro. Ili iras internen. “Mi jam mendis mian biletan,” Heleno diras. “Espereble ni povos trovi por vi lokojn apud la mia.” Ŝi iras al ekrano en la muro kaj tuŝas ĝin. Aperas bildo de la sidlokoj en la kinejo.

“Mia loko estas en la vico F. Bedaŭrinde la apudaj lokoj ne plu estas liberaj. Ne gravas: mi povas ŝanĝi la mian. Jen, estas tri lokoj kune tuj malantaŭe en la vico G. Ni prenu tiujn.” Ŝi tuŝas la ekranon plurajn fojojn.

“Kiel vi pagas?” Filipego demandas.

“Sufiĉas tuŝi la ekranon. Ĝi rekonas miajn fingro-spurojn, kaj aŭtomate prenas la monon el mia banko-konto.”

“Kiom kostas la biletoj?” Filipego diras. “Mi bedaŭras, ke ni ne povas mem pagi. Ni ne havas monon de la 22a jarcento.”



“Ne gravas,” Heleno diras. “Rapidu. Estas jam dudek kvin post la sesa! Ni iru internen.”

Ili iras en la apudan salonon, kaj vidas vicojn de altaj sidlokoj laŭ la kvar flankoj de malpli alta kvadrata scenejo. “Ĉu ni estas en kinejo?” Filipeto diras. “Ĉi tie ni ŝajnas troviĝi en teatro.”

Ili trovas la ĝustan vicon kaj sidiĝas. Preskaŭ tuj, la salono mallumiĝas. Ekaŭdiĝas muziko, tre brua kaj malagrabla al la oreloj de la du Filipinoj. Ili neniam aŭdis ion similan. Tiam aperas la titoloj, kiuj ŝvebas en la aero. La titoloj malaperas, kaj komenciĝas la filmo. Ŝajnas al la du Filipinoj, ke ili spektas ne filmon sed teatraĵon. La aktoroj ŝajnas realaj. Ili moviĝas tra la scenejo, eĉ veturas tra ĝi per diversaj veturiloj, dum la scenoj ŝanĝiĝas rapide kiel en kinejo. La filmo estas tre spektinda, sed la rakonto moviĝas tro rapide por du uloj el la 20a aŭ 21a jarcento. Foje videblas sur la scenejo eĉ du aŭ tri scenoj samtempe.

“Kiun lingvon ili parolas?” Filipino flustras al Heleno.

“Esperanton.”

“Sed ni estas en Anglujo. Kial ili ne parolas la anglan?”

“Ĉar filmoj estas internaciaj! Tiel ili estas spektablaj ĉie en la mondo.”

Virino en la antaŭa vico turniĝas kaj rigardas ilin kolere. “Silentu! Mi provas aŭskulti.”

“Ĉu vi volas spekti la filmon anglalingve?” Heleno flustras sub-voĉe al Filipino. Ŝi tuŝas butonon ĉe lia sidloko, kaj donas ion al li. “Metu tion en vian oreilon.”

Filipeto metas la ilon en sian oreilon, kaj subite la lingvo de la filmo ŝanĝiĝas al la angla.

Sed la aktoroj parolas rapidege per nerekoneblaj vortoj, kaj eĉ en la angla li komprenas preskaŭ neniom. Tamen li ĝuas la filmon.

Kie manĝi?

“Ĉu vi estas malsataj?” Heleno demandas post la filmo. “Ni iru manĝi.”

Filipego diras, “Bedaŭrinde, mi ne havas monon de via epoko. Se mi havus monon, mi invitus vin.”

“Ne gravas,” Heleno diras, “sed mi bedaŭras, ke mi ne povas inviti vin al luksa restoracio. Kien ni iru manĝi? Aŭtomata manĝejo estas plej malmultekosta.”



“Kio estas aŭtomata manĝejo?” Filipeto demandas.

“Oni elektas kion oni volas el la menuo, kaj poste maŝinoj pretigas ĝin en la kuirejo. La manĝaĵoj estas sufiĉe bongustaj,

ĉar oni jam perfektigis la receptojn, kaj ĉiam kuiras ilin laŭ preciza programo. La problemo estas, ke la manĝaĵoj ĉiam gustas precize same. En la luksaj restoracioj estas homaj kuiristoj kaj kelneroj. La manĝaĵoj estas pli variaj, sed ankaŭ la kvalito estas pli varia ol en la aŭtomataj manĝejoj.”

“Realaj kuiristoj kaj kelneroj ne estas novaĵo por ni,” Filipeto diras. “Estus pli interese viziti la aŭtomatan manĝejon. Mi ŝatus iri tien.”



“Mi ĝojas, ĉar tien ni iras,” Heleno diras kun rideto. “Ĉu vi vidas tiun manĝejon trans la strato?”

Ili iras en la manĝejon, kiu havas agrablan etoson. Ĝi estas plena je kreskaĵoj: anstataŭ planko estas herbejo kun floroj, kaj super ĉiu tablo kliniĝas malalta arbo. Same kiel en la subtera fervojo estas lum-plafono, sed ĉi tiu ŝajnas kiel nokta

ĉielo kun luno kaj steloj. Malgrandaj lampoj briletas en la branĉoj de la arboj.

“Ni estas interne, sed ni ŝajnas troviĝi ekstere,” Filipego diras.

Ili sidiĝas ĉe malplena tablo kaj Heleno donas al siaj du kunuloj la menuon. “Kiaj prezoj!” diras Filipego. “Hamburgero kostas sepdek naŭ pundojn! Mi vidas, ke prezoj sufiĉe altiĝis dum la lastaj ducent jaroj.”

“Sepdek naŭ eŭrojn,” Heleno korektas lin. “Ĉu en via epoko ankoraŭ ekzistis pundoj?”

“Kial ĉio estas en Esperanto?” Filipeto demandas. “Ni estas en Anglujo, ĉu ne? Ĉu neniu plu parolas la anglan?”

“Multaj turistoj vizitas Kembriĝon,” Heleno klarigas. “Tial ĉiuj skribaĵoj estas ankaŭ en Esperanto. Rigardu, necesas nur tuŝeti ĉi tiun simbolon sur la karto por ŝanĝi la lingvon.” Filipeto tuŝas la simbolon, kiun ŝi montris, kaj la skribo ŝanĝiĝas al la angla.

Viando el fabriko

La du Filipoj rigardas la menuon en la aŭtomata manĝejo. Filipego demandas, “Ĉu estas io sen viando? Mi estas vegetarano.”



Lia pli juna memo rigardas lin kun surprizo. “Sed mi ŝatas viandon! Kiam vi vegetaraniĝis?”

“Kiam mi estis ĉirkaŭ kvardek-jara,” Filipego diras. “Tiam mi komencis pensi, ke ne estas akcepteble mortigi bestojn por manĝi ilian viandon. Se mi povus manĝi viandon sen la

neceso suferigi bestojn, mi farus.”

Heleno diras, “Ho jes, en via epoko oni ankoraŭ mortigis bestojn por viando, ĉu ne? Sed nuntempe oni ne plu faras tion. Oni kreskigas la viandon en fabrikoj. Do, pra-avo Filipo, vi rajtas manĝi ĝin.”

“Ĉu oni tute ne plu mortigas bestojn?”



“Ekzistas kontraŭ-leĝa merkato de besta viando, ĉar iuj homoj opinias, ke ĝi gustas pli bone ol tiu el la fabrikoj. Mi neniam mem gustumis ĝin. Mi ne volus manĝi veran beston!”

Kiam ili elektis siajn manĝojn, Heleno montras al siaj du praavoj, kiel tuŝi simbolojn sur siaj menu-kartoj por mendi ilin. “Kion vi volas trinki?” ŝi demandas.

“Bieron,” la du Filipoj diras kune.

Necesas atendi nur kelkajn minutojn. Baldaŭ aŭdiĝas agrabla muzika sono de malalta ŝranketo sub ilia tablo. Heleno malfermas ĝian pordon. Interne estas bretoj, kaj sur la bretoj jam estas manĝilaro kaj teleroj kun la pretaj manĝaĵoj. Heleno prenas ĉion el la ŝranko, kaj surtabligas ĝin.

“Du glasoj da biero,” ŝi diras, “frukto-suko por mi, rizo kun kokaĵo por Filipego, kaj hamburgero kun terpomoj por vi, Filipeto. Kaj jen miaj nudeloj.”

Iuj aferoj neniam ŝanĝiĝas. Post la manĝo ili trinkas kafon. Kaj tamen estas unu novaĵo.

“Ĉu ankaŭ la lakto venas el fabriko?” Filipeto demandas.

“Kompreneble,” Heleno diras. “Ĉu vere plaĉas al vi trinki lakton, kiu venis el la mammo de bovino? Kiel naŭze!”

Tasoj de IKEA

La manĝo finiĝis, kaj Heleno pagas per tuŝeto de sia fingro. Poste, tre kontente, la triopo eliras kaj promenas laŭ la strato.

“Kiom da steloj estas videblaj super ni!” Filipego diras. “La ĉielo estas tre klara ĉi-vespere.”



Dum Filipego admiras la ĉielon, lia pli juna memo serĉas la Kembriĝon, kiun li konas. “Ho, mi rekonas tiun malnovan preĝejon! Nun mi scias, kie ni troviĝas! Ni estas en *Market Street* (Bazar-strato), ĉu ne? Sed kie estas la vendejoj? Ili ĉiuj malaperis.”

Heleno klarigas, “Mi scias, ke en via tempo necesis veturi

al vendejoj por fari siajn aĉetojn, kaj poste porti la aĉetaĵojn hejmen. Sed oni ĉesis fari tion antaŭ almenaŭ jarcento. Nun ni simple mendas ĉion per la Reto.”

“Kio estas la Reto?” Filipeto demandas.

Filipego ridas. “Vi ankoraŭ ne scias, kio estas Interreto, sed mi promesas al vi, ke post jardeko ankaŭ vi uzados ĝin!”

“Tamen, ankoraŭ ekzistas kelkaj vendejoj,” Heleno diras. “Precipe en turisma urbo kiel Kembriĝo. Oni vendas memoraĵojn por turistoj, kaj antikvaĵojn. Estas vendejo de antikvaĵoj en ĉi tiu kvartalo. Ĝi estas tre vizitinda.”

“Sed estas tro malfrue. Ĉu la vendejoj ankoraŭ estas viziteblaj en ĉi tiu horo?” Filipeto diras. “Jam noktiĝis.”

“Kial vi supozas, ke oni ne rajtas viziti la vendejojn nokte?” Heleno demandas. “Ĉiam eblas vizitadi la vendejojn.”

Ili trovas la vendejon de antikvaĵoj, kaj Heleno tuj elkrias, “Ho, kiom mi ŝatas ĉi tiajn ĉarmajn historiajn konstruaĵojn!” Al la du Filipinoj la konstruaĵo tute ne ŝajnas ĉarma. Ĝi estas en la stilo de normala vendejo el la malfrua 20a jarcento.

La mebloj en la vendejo estas el iu materialo, kiu ne estas precize plasto, sed ankaŭ ne estas precize ligno. “Kiel belaj malnovaj mebloj!” Heleno diras. “Kaj rigardu sur la breto la malnovajn tasojn.” Ŝi laŭtlegas la etiketon: *Stilo de IKEA. Frua 21a jarcento.* “Ho, tio estas el via epoko, ĉu ne, pra-avo Filipino? Ĉu vi konas tion?”



“Jes,” diras Filipego.

“Ne,” diras Filipeto.

Heleno admiras la tasojn. “Kiel belajn aĵojn oni faradis en via tempo! Mi ŝatus aĉeti unu, sed bedaŭrinde ĝi estas tro multekosta por studento. Tio estas maloftaĵo por riĉaj turistoj, el Niĝerio aŭ simile.”

Filipego ridas. “Ĉu vi ŝatas tasojn de IKEA? Mi portos al vi tutan keston da ili, kiam mi revenos ĉi tien.”

Kiu estas Lunjo?

En la vendejo de antikvaĵoj Filipego kaj Heleno rigardas la tasojn de IKEA. Intertempe, Filipeto malkovris bretaron kun antikvaj libroj. Ili vere estas tre malnovaj, plejparte el la 21a jarcento. Li prenas unu de la breto. Ĝi havas okultrafan flavan kaj nigran kovrilon, kun granda anglalingva titolo *Facebook for Dummies* (Fejsbuko por stultuloj). Li malfermas ĝin kaj komencas legi la unuan paĝon, sed ĝi estas apenaŭ komprenebla. La eldon-dato de la libro estas 2008, kaj por Filipeto la temo estas tute mistera.



Serĉante ion pli kompreneblan, li elprenas alian libron. Ĉi tiu enhavas poeziaĵojn de la fama angla verkisto *William Shakespeare* (Vilhelmo Ŝekspiro). Malfermante la libron, li vidas, ke apud ĉiu poeziaĵo en la originala lingvo estas la Esperanta traduko. Turnante la paĝojn, li venas al la titolpaĝo, kaj tie kun ŝoko li trovas manskribon, kiun li rekonas. Ĝi tre similas lian propran manskribon, kaj ankaŭ la subskribo ŝajnas lia. Fakte, la subskribo ne nur ŝajnas lia, ĝi vere estas lia: Filipo Nakamura. Nur la literumo estas stranga, ĉar Filipo normale literumas sian nomon angle *Philip*, dum ĉi tie la literumo estas *Filipo*. Ĉu eble lia pli aĝa memo iam subskribis ĉi tiun libron? Li vokas Filipegon kaj Helenon, kiuj ankoraŭ admiras la manĝilojn de IKEA.



“Rigardu, kian strangajon mi trovis. Kies estas tiu subskribo? Ĝi estas via, ĉu ne?” li demandas Filipegon.

“Pli via subskribo ol mia,” Filipego respondas. “Rigardu la daton. Ĝi datiĝas de julio 1982.” Li laŭtleĝas la skribaĵon, kiu estas en Esperanto, kaj tradukas ĝin en la anglan por Filipeto: *Al Lunjo post memorinda semajno. Kun bondezirojn, Filipo Nakamura. Antverpeno, en julio 1982.*

Heleno kaj Filipego ekridas. “Oni vidas, ke vi apenaŭ komencis lerni Esperanton,” Filipego diras. “Vi faris gramatikan eraron. Vidu: *kun bondezirojn*. Oni neniam aldonas akuzativon post *kun*.”

“Kio estas akuzativo?” Filipeto demandas.

“Baldaŭ vi malkovros tion,” lia pli aĝa memo respondas.

“Kiu estas Lunjo?” Heleno volas scii.

“Mi ne scias,” Filipeto respondas. “Mi ne konas iun ajn Lunjon. Kaj rigardu: la dato estas julio 1982! Tio estos post nur tri monatoj. Ĉu vere vi opinias, ke mi mem skribis tiun skribaĵon? Ĝi estas en Esperanto, sed mi neniam lernis Esperanton.”

“Nun vi ankoraŭ ne komencis studi Esperanton, sed kiam vi reiros hejmen, vi povos eklerni,” Filipego diras.

“Tio donos al mi nur tri monatojn. Eĉ se mi studados ĉiutage, mi ne povos lerni lingvon en tri monatoj.”

“Vi povos lerni Esperanton en tri monatoj. Ne tre bone, sed sufiĉe.”

Rerenkontiĝo

Filipeto sidas en sia ĉambro. La ĉambro estas tiu sama, en kiu ni unue renkontis lin, kun tablo, seĝo, lito, ŝranko, kaj afiŝo sur la muro. La jaro estas 1982, sed jam pasis du monatoj post la memorinda tago, kiam lia pli maljuna memo aperis en lia ĉambro. Tiam estis aprilo, sed nun estas junio.



Sur la tablo estas la sama granda komputilo kiel antaŭe, sed ĝi estas malŝaltita. Filipo ne uzas la komputilon, sed sidas sur sia lito kaj legas libron. La titolo de lia libro estas *Teach Yourself Esperanto* (Instruu al vi mem Esperanton).

En la ĉambro estas stranga bruoj. Stranga bruoj kaj stranga lumoj. Kio okazas? Filipino eksaltas de sia lito kaj atente rigardas la lokon, de kie aŭdiĝas la bruoj. De du monatoj li esperas kaj deziras reaŭdi tiun sonon!



Aperas en la ĉambro granda ŝranko. La pordo malfermiĝas. Kiam la tempomaŝino la unuan fojon aperis en lia ĉambro, Filipino timis kaj eĉ svenis. Sed ne ĉi-foje. Li nur atendas senpacience.

Homo venas el la maŝino. La homo ne estas lia pli aĝa memo. Fakte ĝi tute ne estas viro. “Heleno!” ĝoje krias Filipino. “Mi ne plu atendis vidi vin!”

Heleno ridetas kaj brakumas lin. “Kiom mi ĝojas revidi vin! Kaj mi estas kontenta troviĝi en la ĝusta loko. Mi memoris, ke vi diris, ke via ĉambro estas sama kiel mia.”

“Jes, sama, sed ne simila, ĉu ne?” Filipo kun iom da embaraso ĝustigas la litkovrilojn. Li ne atendis vizitanton, precipe ne vizitantinon el la estonteco, kaj li ankoraŭ ne ordigis sian liton. Heleno intertempe rigardas ĉirkaŭ si kun intereso. Hodiaŭ ŝi ne surhavas sian travideblan plastan veston, sed komfortan molan veston el normala ŝtofo. Ankaŭ ŝia hararo ne plu estas blua, sed bruna.




Heleno iras al la libro-bretaro por legi la titolojn. “*Fundamentals of Physics*” ŝi legas (Fundamentoj de fiziko) kaj tiras la libron de la breto. La dika libro estas pli peza ol ŝi atendis, kaj ŝi preskaŭ faligas ĝin. “Kiom ĝi pezas!” Ŝi penas la libron en sia mano. “Ĉu oni ankoraŭ ne inventis la elektronikan legilon? Kiel maloportune! Certe oni ne povus porti ion tian en la subtera fervojo!”

“Mia ĉambro ne estas tre vizitinda,” Filipino diras. “Ĉu vi volas iri eksteren por vidi la urbon? Sed via vesto estas iom nekutima. Kio ĝi estas? Ĉu piĝamo? aŭ gimnastika vesto? Eble mi povos trovi por vi ĝinzon.”

“Ĉu ĉi tiu vesto ne estas ĝusta?” Heleno diras. “Kia senluziiĝo!”

La ĉarmo de la 20a jarcento

Filipo diras al Heleno, "Via vesto estas iom nekutima. Kio ĝi estas? Ĉu pijamo? aŭ gimnastika vesto? Eble mi povos trovi por vi ĝinzon."



“Ĉu ĉi tiu vesto ne estas ĝusta?” Heleno diras. “Kia seniluziigo!”

Mi petis la komputilon doni al mi veston de la 80aj jaroj de la 20a jarcento.”

Filipo serĉas en sia vestoŝranko kaj eltiras ĝinzon. “Espereble, ĉi tio havas la ĝustan grandecon por vi. Bonŝance ni estas pli-malpli same altaj.”

Heleno surmetas la ĝinzon, sed ŝi ne scias, kiel fermi la zipon, kaj Filipo devas montri al ŝi. La ĝinzo estas perfekta por Heleno, sed ŝi trovas ĝin tre malkomforta.



“Kia vestaĉo! La ŝtofo estas tiel rigida! Kaj ĝi estas tiel mallarĝa, ke mi apenaŭ povas spiri.”


Kiam Heleno estas preta, ŝi kaj Filipo eliras kune en la koridoron. Ili devas longe atendi la lifton, kaj Filipo iom hontas, ĉar li memoras la oportunan akuratecon de la 22a

jarcento. Sed por Heleno ĉio estas interese historia.

“Certe ĉe vi la vivo estas pli trankvila kaj malpli streĉa ol en mia epoko,” ŝi diras.

Ŝi komencas ŝanĝi sian opinion, kiam ili venas eksteren en la straton, kaj ŝi aŭdas la bruegon de la trafiko. La trotuaro estas mallarĝa, kaj ŝi ekpaŝas en la vojon.

“Atentu!” Filipino krias, kaj samtempe aŭtomobilo laŭte hupas.



Li kaptas ŝian brakon, kaj apenaŭ ĝustatempe tiras ŝin sur la trotuaron. La ŝoforo kriaĉas ion al ili el sia malfermita fenestro. “Vi devas marŝi sur la trotuaro,” Filipino klarigas al ŝi. “La vojo estas nur por aŭtomobiloj.”

Bonŝance, estas bela junia posttagmezo, do la vetero estas

agrabla varma. Filipino memoras, ke la vestoj de la estonteco estis facile ĝustigeblaj, do li estas kontenta, ke hodiaŭ ne necesas surmeti jakon aŭ pardonpeti pro la malvarmo. Tamen li rimarkas en la ĉielo grandan grizan nubon, kaj li demandas sin maltrankvile, ĉu poste pluvos. Li ne posedas ombrelon, kaj li ne deziras, ke Heleno kaptiĝu sub pluvo dum sia unua vizito al la 20a jarcento.

Heleno ne rimarkas la grizan nubon. Ŝi trovas ĉion ĉarme antikveca, admiras la objektojn en la vendejaj montrofenestroj, kaj spektas kun ioma amuzo, dum Filipino aĉetas kelkajn aĵetojn ĉe malgranda supervendejo.

Poste ili promenas laŭ la rivero. “De kie vi havis la tempomaŝinon?” Filipino demandas Helenon.

“Mi heredis ĝin. Mia familio posedas ĝin de multaj generacioj. Konstruis ĝin mia pra-pra-pra-pra-avo Filipino Nakamura.”

“Kaj tiu estas mi, ŝajne, kvankam mi trovas tion stranga penso. Evidente iam en la baldaŭa estonteco, mi mem konstruos la tempomaŝinon, kiun vi poste heredos.”


“Unue vi devos el-labori vian faman teorion: la teorion Nakamura pri tempo. Per tio vi povos konstrui la tempomaŝinon.”

“Kaj kion diras tiu teorio?”

“Ĝi estas tro malsimpla por klarigi dum promenado. Ni bezonos komputilon: ne tiun prakomputilon, kiun mi vidis sur via tablo, sed modernan komputilon. Bonŝance, mi kunportis rapidan komputileton. Ni reiru al via ĉambro, kaj mi klarigos al vi la teorion, per kiu eblos konstrui la tempomaŝinon.”

Malsano

Filipo supren-iras la ŝtuparon ĝis sia ĉambro. Li ne havas paciencon por atendi la lifton kaj ĉiam preferas grimpi laŭ la ŝtupoj. Kiam li venas al la ĝusta pordo, li serĉas tra siaj poŝoj la ŝlosilon, finfine trovas ĝin, kaj malŝlosas la pordon.



Enirante la ĉambron, li estas tre kontenta vidi tie du altajn kestojn. Unu estas la tempomaŝino de Heleno, la alia estas la duone konstruita maŝino, kiun Filipo konstruas per ŝia helpo. Sed kie estas Heleno?

Filipo aŭdas mallaŭtan ĝemon de la lito. Heleno kuŝas tie kun

fermitaj okuloj. “Heleno!” li diras. “Kio estas? Ĉu vi havas kapdoloron? Ĉu vi estas en ordo?”

Ŝi malfermas la okulojn. “Mi ne scias, kio estas. Mi fartas malbone. Mi sentas vomemon kaj... Pardonu, mi revenos tuj.” Ŝi leviĝas subite de la lito, kaj kuras eksteren. Filipino scias, ke ŝi kuras al la necesejo en la koridoro.



Kiam ŝi revenas, ŝia vizaĝo estas blanka. Ŝi sidiĝas denove sur la lito. “Mi ne scias, kion fari. Mi fartas terure. Nun mi ekpensas, ke mi ne estas vakcinita kontraŭ malsanoj de la 20a jarcento. Eble mi infektiĝis, kiam ni iris al la kafejo aŭ al la dancejo. Kion ni faru?”

Filipo pensas. Li estas maltrankvila. Antaŭ kelkaj vesperoj, li

invitis Helenon veni kun li al la studenta trinkejo kaj poste al diskoteko, kaj tie ili renkontis ĉiujn liajn geamikojn. Li tiam ne pensis, ke ŝi povus infektiĝi pro unua kontakto kun amaso da homoj el alia jarcento.

“Ĉu vi havas febron?” li demandas Helenon. Li tuŝas ŝian vangon. Efektive, ŝi estas varmega. Filipino ne posedas termometron. “Vi bezonas kuraciston,” li diras. “Estas kuracisto ĉi tie ĉe la universitata san-servo, sed la problemo estas, ke tiu servo estas nur por studentoj de la universitato.”



Heleno demandas per malforta voĉo, “Ĉu vi ne povus denove diri, ke mi estas via kuzino el Meksiko?”

Tio estis la klarigo, kiun Filipino donis al siaj geamikoj, kiam li

kaj Heleno iris al la danco. Kompreneble, li ne povis diri al ili, ke ŝi venas el la estonteco.

“Mi havas pli bonan ideon,” Filipino diras. “Mia pli aĝa fratino estas kuracistino. Ŝi laboras ĉe la malsanulejo. Atendu ĉi tie, dum mi provos telefoni al ŝi.”

Ĉu vi, kara leganto, memoras, kiel oni faris telefonvokojn en malproksima 1982, antaŭ ol ĉiuj posedis sian propran poŝ-telefonon? Filipino prenas amason da moneroj, kaj kuras eksteren al telefono en la koridoro por voki sian fratino. Telefoni al malsanulejo neniam estas facile, precipe per publika telefono, sed finfine li aŭdas la voĉon de sia fratino. Li klarigas al ŝi, ke en sia ĉambro li havas eksterlandan vizitantinon, kiu estas malsana. Li ne povas diri al sia fratino, ke tiu estas ilia meksika kuzino, ĉar ŝi tuj scius, ke tio ne estas vera. Sed la vera klarigo estas eĉ malpli kredebla: ke Heleno estas ŝia propra pra-nevino el la estonteco. Do, Filipino ne provas klarigi, kaj lia fratino supozas, ke tiu estas iu eksterlanda kor-amikino, kiun li kontraŭregule gastigas en sia ĉambro.

“Ĉu ŝi ne havas san-asekuron?” ŝi demandas. “Estas tre malsaĝe, vojaĝi eksterlanden sen asekuro. Bone, mi baldaŭ finos mian deĵoron. Venigu ŝin ĉi tien, kaj mi kontrolos ŝin.”

“Ŝi fartas tro malbone por veni ĝis la malsanulejo,” Filipino diras. “Ŝi vomas, kaj ofte bezonas kuri al la necesejo. Ĉu vi ne povus veni ĉi tien?”



Lia fratino estas ĝenata. “Mi jam deĵoris dek du horojn. Mi estas dormema. Mi volas iri hejmen.”

“Mi ne scias, kion fari,” Filipino diras. “Mi vere estas tre maltrankvila pri ŝi. Mi bedaŭras pro la ĝeno sed... Roberta, mi petas, mi petegas vin veni.”

Lia fratino ne estas kontenta, sed finfine ŝi konsentas veni. Eble ŝi estas scivola pri ĉi tiu nova amikino de sia pli juna frato, kiu venis el Meksiko kaj dormas en lia ĉambro.

Sandviĉo kun ovo

Post la telefonvoko al sia fratino, Filipino reiras al sia ĉambro. Li vidas, ke Heleno dormas sur la lito. La unua neceso estas kaŝi la du tempomaŝinojn, antaŭ ol lia fratino (la pra-onklino de Heleno) alvenos. Li jam scias, kiel fari tion. La tempomaŝino, kiun li kaj Heleno kune konstruas, estas programita por rekoni lian voĉon. Necesas nur diri du voĉajn komandojn: *Malgrandiĝu* kaj *Malvidebliĝu*. Filipino diras la du komandojn, kaj la duone konstruita maŝino unue ege malgrandiĝas, kaj poste fariĝas malvidebla.

Bedaŭrinde la tempomaŝino de Heleno ne akceptas voĉajn komandojn de aliaj homoj. Filipino devas vekti Helenon, kiu diras la komandon per malforta voĉo. Poste ŝi tuj re-endormiĝas, dum li kaŝas la du malvideblajn objektojn en la ŝranko.

Estas frapo ĉe lia pordo. Jen lia fratino Roberta. “Kie estas via amikino?”

“Ŝi kuŝas sur la lito. Ŝi dormas.”

Roberta rigardas. “Tiu lito estas mallarĝa por du homoj.”

Filipo ruĝiĝas. “Ŝi normale ne dormas ĉe mi. Sed hodiaŭ ŝi subite fartis tre malbone.”

Roberta vekas Helenon. “Saluton! Mi estas la fratino de Filipino. Ni vidu, kio estas la problemo. Unue ni kontrolu vian temperaturon.”



Ŝi prenas termometron el sia teko kaj metas ĝin en la buŝon de Heleno. Filipino pensas en si mem, ke al Heleno la kuracistaj iloj de la 20a jarcento certe ŝajnas ridinde antikvecaj. Post momento Roberta reprenas la termometron kaj rigardas ĝin.

“Hm, ŝi fakte havas iom da febro.” Ŝi demandas Helenon, “Ĉu vi havas ian doloron?”

“Jes, en la ventro mi foje havas subitan fortan doloron, kaj tiam mi devas rapidi al la necesejo,” Heleno diras iom honte.

Roberta explore premas per sia mano la ventron de Heleno kaj aŭskultas ĝiajn bruojn per sia kuracista aŭskultilo.

“Ĉu vi manĝis ion nekutiman dum la lastaj du tagoj?” ŝi demandas.

“En la studenta trinkejo mi gustumis sandviĉon kun... kun ovo.” Heleno ĝemas, kiam ŝi diras tiun vorton, kaj forturnas sian kapon.

Filipo vidas, ke la nura memoro pri tiu ovo preskaŭ vomigas ŝin.



Li bedaŭras, ke li konvinkis ŝin manĝi ĝin. Neniam antaŭe ŝi manĝis veran ovon el vera kokino.

“La afero ne estas tro serioza,” la kuracistino trankviligas ilin. “Iu manĝaĵa viruso infektis vin, kiel ofte okazas al vojaĝantoj.”

Ŝi prenas paperon el sia teko, kaj rapide skribas ion per la kutima nelegebla skribaĉo de kuracisto. “Vi devos preni ĉi

tiujn pilolojn po unu ĉiun okan horon dum kvin tagoj, kaj manĝu malmulte dum la venontaj du tagoj: nur iom da rizo kaj rostita pano. Nun mi iros hejmen. Ĝis, Filipino. Telefonu foje al panjo kaj paĉjo. Hieraŭ ili demandis min, kiel vi fartas.”



“Mi tuj iros aĉeti por vi la pilolojn,” Filipino diras al Heleno, kiam lia fratino estas for. “Mi bedaŭras pro la ovo. Mi ne pensis, ke tio povus malsanigi vin.”

“Ne necesas pardonpeti,” Heleno diras. “Sed ne ĝenu vin aĉeti la pilolojn. Kie vi kaŝis mian tempomaŝinon? Mi iros hejmen.”

“Ĉu vere? Sed vi estas malsana! Vi ne povas foriri nun!”

Heleno aŭdigas malfortan ridon. “Termometroj en la buŝo! Piloloj dum kvin tagoj! Kia bonŝanco, ke mi vivas en la 22a

jarcento! Hejme mi trovos kuracilon, kiu kuracos min en duona horo. Ne timu: mi iros hejmen nun, kaj morgaŭ mi revenos, tute sana kaj preta por helpi vin fin-konstrui vian tempomaŝinon.”

La teorio Nakamura

“Filipo! Filipo! Vekiĝu!”

Filipo malfermas siajn okulojn kaj vekigās kun ŝoko. Apud lia lito staras viro. Filipo krias, kaj sidiĝas subite en la lito. Tiam li vidas, kiu estas lia vizitanto. Tiu estas li mem, el la estonteco.



“Vi timigis min,” li diras, iom ĝenate. “Kion vi volas?”

“Mi volas paroli al vi pri la tempomaŝino... kaj pri Heleno. Kiel progresas la laboro?”



“Sufiĉe bone. Baldaŭ la tempomaŝino estos preta. Heleno ofte vizitas min, kaj ni konstruas ĝin kune. Ŝi instruas al mi la fizikan teorion, kiun oni bezonas por kompreni la komputilan programon, kiu regas la maŝinon. La fizika teorio estas malfacila, do ŝi devas multe klarigi al mi.”

“Iom post iom vi komprenos pli bone. Post dek jaroj, vi estos preta eldoni la teorion.”

“Sed mi ne rajtas eldoni tiun teorion! Ĝi ne estas mia. Mi lernas ĝin de Heleno.”

“Mi scias, sed nenio estas farebla pri tio. Dum vi konstruas la tempomaŝinon helpe de tiu teorio, vi lernas aferojn, kiuj estas preter la atingo de ĉiuj aliaj fizikistoj de via epoko. Vi ne povos kaŝi ilin. Vi devos eldoni ilin.”

“Sed laŭ Heleno vi estas fama pro tiu teorio! Oni nomas ĝin la teorio de Nakamura, kaj ĉiuj estontaj studentoj de fiziko devos studi ĝin. Ĉu do vi famiĝis pro teorio, kiun vi ne mem ellaboris?”

“Bonŝance ne. En 2012 mi jam estas sufiĉe konata pro miaj esploroj, sed ne pro tiu teorio. Ĝi enhavas tro da novaj ideoj por la sciencistoj de la frua 21a jarcento. Mia artikolo pri ĝi aperis en ne tre konata scienca revuo, kaj nun ĝi restas ie, neatentate, sur biblioteka breto. Mi ne scias, kiam ĝi famiĝos: espereble nur post mia morto, ĉar efektive mi ne deziras famiĝi pro teorio, kiun mi ne mem kreis. Sed ne pro tio mi venas nun por paroli kun vi. Kiel progresas via studado de Esperanto?”

“Kiel vi scias, ke mi ekstudis Esperanton?”

“Kompreneble mi scias. Kaj nun vi devas aliĝi al la Universala Kongreso.”

“Kio estas Universala Kongreso?”

“Tio estas la plej granda ĉiu-jara renkontiĝo de esperantistoj. Ĝi okazos ĉi-jare en Belgujo, en Antverpeno.”


“Sed mi estas studento. Mi ne havas monon por vojaĝi al Belgujo.”

“Vi vojaĝos sen-page. La tempomaŝino moviĝas ne nur tra la tempo, sed ankaŭ tra la spaco. Ĉu vi memoras la libron, kiun vi trovis en la antikvejo, kiam ni vizitis Helenon en la estonteco? En ĝi estis via subskribo, kun dediĉo al Lunjo. Lunjo estas brazila. La pasintan jaron ŝi ĉeestis la Universalan Kongreson en Brazilo, kaj ĉi-jare ŝi venos al Antverpeno. Vi nepre devos renkonti ŝin.”

Nedezirata konsilo

Filipego parolas kun sia pli juna memo. “Aliĝu al la Universala Kongreso. Vojaĝu al Belgujo. Vi nepre devas renkonti Lunjon.”

Filipeto estas ĝenata. “Kial mi devas renkonti ŝin? Mi ne volas iri al Esperanto-kongreso.”



“Aŭskultu, Filipeto, mi scias, ke ĉiutage vi pli enamiĝas je Heleno. Mi bone komprenas tion; ŝi estas aminda junulino. Sed estas senutile enamiĝi je iu el la estonteco. Krome, kaj pli grave, ŝi estas via poste-ulo. Estas malsaĝe kaj malkonsilinde enamiĝi je via propra posteulo. Ĉesu pensi pri ŝi. Tio estas nerealigebla.”

Filipeto koleriĝas. “Mi ne amas Helenon. Kion vi scias pri la afero? Vi kredas, ke vi scias ĉion pri mi.”

“Kompreneble mi scias,” Filipego diras milde. “Mi memoras miajn sentojn de antaŭ tridek jaroj. Aŭskultu, Filipeto, mi ne estas via patro... nia patro. Mi estas vi mem.”

“Nia patro...” Filipeto ektimas. Subite li komprenas, ke lia pli aĝa memo povus rakonti al li aferojn pri la estonteco, pri lia familio, kiujn li eble ne volus scii.


Filipego komprenas lian penson. “Mi ne rakontos al vi pri via estonteco. Pri iuj aferoj oni devus nek demandi, nek scii. Ĉiuokaze, ne maltrankviliĝu: via estonteco plejparte estos sukcesa kaj feliĉa. Vi estos sukcesa pro viaj propraj laboro kaj penado, ne pro teorio, kiun via posteulo portis al vi el la estonteco. Nun, aŭskultu kion vi devas fari. Aliĝu al la Esperanto-kongreso kaj vojaĝu per la tempomaŝino al Belgujo. Vi devos esti antaŭ la stacidomo de Antverpeno por renkonti Lunjon, kiam ŝi alvenos. Mi scias, ke Heleno estas aminda, sed ankaŭ ŝia pra-avino Lunjo estas aminda.”

“Ĉu ŝia pra-avino? Kion vi diras al mi?”

“Lunjo estos la pra-avino de Heleno,” la maljunulo ripetas. “Vi estos ŝia praavo, kaj Lunjo estos ŝia praavino. Kion tio signifas? Pripensu.”

Filipeto silentas.

Intertempe, lia pli aĝa memo daŭrigas, “Lunjo alvenos ĉe la Centra Stacidomo de Antverpeno la 24an de julio, per rekta aŭtobuso el la flughaveno de Bruselo je 11.45. Atendu ŝin ĉe la haltejo de la aŭtobuso. Iru al ŝi. Parolu kun ŝi. Invitu ŝin al kafejo. Aĉetu por ŝi kafon.”



“Sed ŝi ne konas min! Ŝi ne volos paroli kun mi. Kaj kiel mi rekonos ŝin? Kiel ŝi aspektas? Ĉu vi havas foton de ŝi?”

“Bedaŭrinde, ne ĉi tie. Sed vi rekonos ŝin. Ŝi havas brunan haŭton, mallongan nigran hararon, okulvitrojn...Ha jes, kaj nun mi memoras... Ŝi surhavas T-ĉemizon kun skribo en Esperanto. Orangkoloran T-ĉemizon.”

“Kiel mi parolos al ŝi?” la junulo demandas. “Mia Esperanto ankoraŭ ne estas sufiĉe bona por konversacii.”

“Sufiĉe bona. Jen malnova numero de la revuo *Kontakto*. En ĝi estas ŝia artikolo... bedaŭrinde, sen foto. Diru al ŝi, ke vi legis ĝin. Tio plaĉos al ŝi.”

Filipeto prenas la revuon, kiu datiĝas de la antaŭa jaro, kaj trafolumas la paĝojn. En ĝi li trovas tre seriozan artikolon pri malarmado, de iu Lunjo Da Silva. Li rigardas la artikolon dube. La Esperanto estas malfacila, kaj la temo ŝajnas al li tre serioza. Ĉu vere li povus ŝati la junulinon, kiu verkis tian artikolon?

“Fidu min,” diras la maljunulo. “Mi promesas, ke ŝi parolos kun vi kaj akceptos vian inviton al kafo. Estu tie antaŭ la stacidomo je kvarono antaŭ la tagmezo.”

“En ordo,” diras Filipeto.

Sed li ne estas kontenta.

Lunjo

Lunjo paŝas malsupren de la aŭtobuso, tirante post si pezan valizon. Ŝi estas laca kaj iom konfuzata. Ŝi ĵus pasigis malkomfortan nokton en aviadilo el Brazilo, kaj en aviadilo oni ne dormas bone.



“Kion mi faru nun?” ŝi pensas. “Unue mi devas liberiĝi de ĉi tiu valizaĉo, tiam duŝi min... kaj poste, dormi! Sed kiel trovi la studentan hejmon? Certe estas taksioj antaŭ la stacidomo... sed ne, taksio estus tro multekosta. Mi iros aŭtobuse. Sed kiu estas la ĝusta aŭtobuso? Kaj kie mi aĉetu la bileton? Ĉu en la stacidomo? Ho ve!”

Krom la valizo Lunjo havas malpli grandan sakon. Meze de

la trotuaro ŝi haltas, demetas sian valizon, malfermas sian sakon, kaj elprenas libreton. La libreto estas la Dua Bulteno de la 67a Universala Kongreso de Esperanto. Lunjo foliumas ĝin, serĉante la adreson de la studenta hejmo.

“Saluton,” diras voĉo apud ŝi. “Ĉu vi estas Lunjo Da Silva?”

Lunjo levas sian kapon el la Dua Bulteno. “Kiel vi sciis tion?” ŝi demandas kun surprizo.



“Mi legis vian artikolon en *Kontakto*. Ĝi estas tre interesa. Mi volis renkonti vin.”

Lunjo estas tiel ĝojplena, ke ŝi ne rimarkas, ke ĉi tiu afabla junulo ne respondis ŝian demandon. “Ho, dankon! Mi estas kontenta, ke la artikolo plaĉis al vi. Ĉu ankaŭ vi estas ĉi tie por

la kongreso? El kiu lando vi estas?”

“Mi estas Filipino, el Britujo. Ĉu mi povas helpi vin?” Filipino parolas malrapide kaj necerte. Neniam antaŭe li konversaciis en Esperanto.

“Fakte, jes. Mi serĉas la studentan hejmon. Ĉu ankaŭ vi loĝos tie dum la kongreso?”

“Ne, mi estas en hotelo.”

“Ĉu vere? Lukse!”

Filipo ridetas, iom honte. Li ne klarigas, ke li nepre devis mendi hotelĉambbron, ĉar li bezonas lokon por kaŝi sian tempomaŝinon.

“Ĉu vi scias, kie oni aĉetas biletojn por la aŭtobuso?” Lunjo demandas.

Filipo memoras la konsilon, kiun li ricevis de sia pli aĝa memo. Li devas inviti ĉi tiun junulinon al kafejo. La problemo estas, ke Filipeto estas iomete timema. Li ne kutimas inviti junulinojn kuntrinki kafon nur kvin minutojn post la unua renkontiĝo. Lia pli aĝa memo promesis, ke ŝi akceptos la inviton, sed al la junulo mankas kuraĝo.

“Eble en la stacidomo,” li respondas. “Ĉu vi scias la numeron de la aŭtobuso?”

En tiu momento, Lunjo oscedas. “Pardonu,” ŝi diras. “Mi estas tre laca. Mi ĵus venis de nokta flugo, kaj...”



Finfine, Filipino kaptas sian ŝancon. “Ĉu nokta flugo? Do, vi certe bezonas kafon, ĉu ne? Rigardu, estas kafejo trans la strato.”

Lunjo tuj feliĉiĝas. Kafo! Forta, nigra kafo!

“Tio ne estas malbona ideo,” ŝi konsentas.

Filipo kaptas la valizon de Lunjo kaj levas ĝin. En 1982, valizoj kun radoj estas ankoraŭ malofta novaĵo.

“Diable,” li diras. “Tio estas peza! Kion ĝi enhavas?”

“Novajn brazilajn eldonaĵojn por la libroservo,” diras Lunjo, sekvante Filipon trans la straton.

Kafo kun lakto

En la kafejo, Lunjo kaj Filipino prenas sidlokojn apud la fenestro. Venas kelnerino, kaj Filipino mendas teon kun citrono por si mem kaj kafon por Lunjo.

Dum ili atendas, Lunjo demandas, “Mi ĝojas, ke vi trovis mian artikolon interesa. Sed kiel vi sciis, ke mi verkis ĝin? Ĉu nur hazarde vi preterpasis tiun haltejon precize en la momento, kiam mi eliris el la aŭtobuso?”



Bonŝance por Filipino, en tiu momento revenas la kelnerino kun du tasoĵ. Lunjo tuj kaptas sian tason, sed tiam remetas

ĝin kun vizaĝesprimo, en kiu vidiĝas forta seniluziiĝo. “Sed mi petis kafon! Ĉi tio enhavas lakton!”

“Jes, kompreneble,” Filipino diras kun surprizo. “Se vi preferas kafon sen lakto, vi devus peti nigran kafon.”

“Mi ne sciis.” Lunjo gustumas la kafon kaj grimacas. “Lakto! Kiel naŭze!”

“Ĉu vi volas interŝanĝi? Mia teo ne enhavas lakton, sed citronon. Prenu mian teon, kaj mi trinkos vian kafon.”

“Dankon,” Lunjo diras.



“Ne dankinde,” Filipino respondas, kaj ili interŝanĝas siajn tasojn. Lunjo tuj aldonas du grandajn kuleretojn da sukero.

“Ĉu vi volas ion manĝi?” Filipino prenas la karton, kiu staras en tenilo meze de la tablo, kaj rigardas ĝin. “Ĉu sandviĉon? Kun ŝinko, fromaĝo, ovo...”

Lunjo grimacas denove. “Ne kun ovo. Ŝinko.”

“Ĉu vi ne ŝatas ovojn?” Filipino demandas Lunjon.

“Ne, mi abomenas ilin. Eĉ la odoro preskaŭ vomigas min. Kial vi ridas?”

“Ĉu mi ridis? Pardonu min. Sed vi pensigis min pri alia konato mia, kiu same abomenas ovojn.”

Filipo mendas de la kelnerino du sandviĉojn kun ŝinko, kaj dum ili manĝas, Lunjo priskribas al li sian laboron ĉe la oficejo de Brazila Esperanto-Ligo. Poste ŝi invitas Filipon rakonti pri si mem. Lia kono de Esperanto ankoraŭ ne sufiĉas por ke li informu ŝin pri siaj esploroj ĉe la Universitato de Kembriĝo, sed li jam lernis ĉiujn vortojn, kiuj rilatas al la familio. Do, li rakontas al ŝi pri siaj familianoj. Li klarigas, ke kvankam lia patrino estas angla, li havas japanan patron. Tial li havas japanan familian nomon.

Li rakontas al Lunjo pri ĉiuj familianoj krom unu. Li diras nenion pri sia pra-pra-pra-pra-nepino, kiu iam estos pra-pra-pra-pra-nepino ankaŭ de Lunjo. Krome, li tute ne informas ŝin pri la tempomaŝino. Post la manĝeto, ili marŝas al la stacidomo, kie Filipino helpas Lunjon informiĝi pri la aŭtobusoj kaj aĉeti la bileton por atingi la studentan hejmon. Ili konsentas renkontiĝi pli malfrue tiun saman posttagmezon en la kongresejo. Tiam ili disiĝas.

Nur poste, kiam ŝi jam sidas en la aŭtobuso, Lunjo subite memoras, ke Filipino neniam respondis ŝian demandon, kiel li sciis ŝian nomon.

Tro rapida semajno

En la posttagmezo, la gejunuloj renkontiĝas en la kongresejo. Lunjo jam estas spertulo. “Unue ni devas iri al la akceptejo por preni niajn dokumentojn kaj niajn kongresajn sakojn. Ĉu vi kunportas vian kongresan karton?”



La enirejo de la kongresejo estas granda halo, kaj tie Filipino malkovras novan mondon. Homoj de ĉiuj mondopartoj

renkontiĝas kaj salutas unu la alian. Ĉiuj portas insignon. En la akceptejo li transdonas sian kongresan karton, kaj tie ankaŭ li ricevas tekon kun la kongresa libro, pluraj informiloj, kaj la kongresa insigno.

Dum la kongresa semajno, Filipino multe plibonigas sian Esperanton, kvankam ankoraŭ ne perfektigas ĝin. Kun Lunjo li vizitas la kongresajn aranĝojn: la inaŭguron, la lingvokursojn, la prelegojn, la koncertojn. Sed eĉ pli li ĝuas la junularan programon. En la vesperoj, ĉiuj gejunuloj renkontiĝas en ies ĉambro en hotelo aŭ en la studenta hejmo, kie ili kune babilas, ridas kaj amuziĝas. Iom post iom Filipino ĉesas pensadi pri Heleno, kaj pli kaj pli ĝuas la kunestadon kun moderna junulino el Brazilo.

La ĉefa plezuro de Esperanto-kongreso ne estas la kongreso mem, sed la homoj, kiujn oni renkontas tie. Se oni pasigas la tempon kun nova kor-amiko aŭ -amikino, la sep tagoj de la kongreso fariĝas neforgesebla sperto. Ĉiutage Filipino renkontas Lunjon, li babilas kun ŝi, li rakontas al ŝi ĉion pri si mem... sed pri unu afero li daŭre silentas. Kaj tio maltrankviligas Filipon. Li volas esti sincera kun Lunjo, li ne volas kaŝi de ŝi aferojn, kaj la tempomaŝino estas tiel grava parto de lia nuna vivo, ke ne paroli pri ĝi estas preskaŭ mensogo. Sed rakonti pri la tempomaŝino signifus rakonti pri Heleno, kaj tion li ne volas fari.

Kiam oni amuziĝas, la tempo pasas rapide, tro rapide. Dimanĉon, la kongreso komenciĝis per la Solena Inaŭguro, kaj al Filipino ŝajnis, ke ankoraŭ restas amaso da tempo. Sed baldaŭ jam estas merkredo, kaj la semajno jam estas duone for. Kaj preskaŭ tuj sekvas ĵaŭdo, vendredo, kaj nun restas nur la lasta Teatra Vespero kaj la Solena Fermo la postan matenon.

Baldaŭ Filipeto devos reveturi al Britujo kaj Lunjo al Brazilo.

Filipo scias, ke li ne volas perdi kontakton kun Lunjo. Sed antaŭ ol ŝi foriros, li devos rakonti al ŝi la aferon, pri kiu li silentadis la tutan semajnon. Li devos rakonti al ŝi pri la tempomaŝino.



La kongresejo de Antverpeno estas en interesa loko: ĝi troviĝas meze de la urba bestoĝardeno. Vendredon posttagmeze, Filipo invitas Lunjon promeni kun li tra la bestoĝardeno. Dum ili rigardas la simiojn, la elefantojn, la zebrojn, Filipo la tutan tempon demandas sin mem, kiel li povos klarigi al Lunjo pri la tempomaŝino. Ĉu ŝi koleros, ke li ne jam rakontis al ŝi aferon tiel gravan?

Dum ili vagas tra la bestoĝardeno, li serĉas lokon ne tro

publikan, kie ili povos paroli kune pri seriozaj aferoj. Finfine li rimarkas benkon en iom kaŝita angulo malantaŭ la domo de la ĝirafoj. “Stranga afero okazis al mi antaŭ kelkaj monatoj. Mi volas rakonti al vi pri ĝi.”



Malfacila klarigo

Lunjo rigardas Filipon kun surprizo. Ŝia vizaĝo montras, ke trafas ŝin io nekutima en lia voĉo. “Kio estas?”

“Mi laboris en mia ĉambro, kiam mi aŭdis strangan bruon. Ŝranko aperis en mia ĉambro. Ĝi aperis subite, el nenie.”

Lunjo rigardas Filipon kun zorga esprimo. Filipino scias, ke ŝi demandas sin, ĉu li freneziĝis. “Atendu, mi volas montri al vi ion.” Li rigardas dekstren kaj maldekstren por kontroli, ke neniu vidas ilin, tiam li prenas objekton el sia kongresa teko. “Ĉu vi scias, kio estas ĉi tio?”

Lunjo rigardas. Ŝi miras, miregas. “Mi ne scias. Mi neniam vidis ion similan. Kio ĝi estas?”

“Tio estas komputilo el la jaro 2182.”

Lunjo tuj komprenas, ke Filipino ne mensogas. Dum sia tuta vivo ŝi neniam vidis ion ajn eĉ iomete similan al la malgranda objekto, kiun la junulo montras al ŝi. Ŝi timas. Ŝi sentas vomemon kaj eĉ svenemon. La aĵo, kiun li tenas en sia mano, estas malgranda, proksimume same granda kiel libro. Ĝi estas plena je formoj kaj koloroj, kiuj moviĝas, ŝvebas, dissolviĝas, kaj reformiĝas, kreante neimageblan nubon de desegnoj kaj koloroj. Ĝi estas la komputilo de Heleno.

Kaj nun Filipino komencas sian rakonton. Li rakontas al Lunjo, kiel lia pli aĝa memo alvenis en la tempomaŝino. Li rakontas al ŝi ĉion, kaj tamen ne ĉion. Li rakontas al ŝi pri Filipego, pri ilia kuna vizito al la estonteco, pri la kinejo kaj la restoracio. Sed ial, Heleno ne ludas gravan rolon en lia rakonto... kaj

bonŝance, Lunjo ne scivolas, kiajn vestojn oni portas en la estonteco, ĉar tion li certe ne volus priskribi. Li ankaŭ ne klarigas, ke Heleno helpis lin konstrui la tempomaŝinon. Kvankam li ne precize diras tion, iel li sukcesas doni la impreson, ke lia ĉefa helpanto estis lia pli aĝa memo.



“Kie estas tiu tempomaŝino?” Lunjo demandas.

“En mia hotelĉambro. Mi lernis, kiel malgrandigi kaj malvidebligi ĝin. Mi tenas ĝin kaŝita en la vestoŝranko.”

“Ĉu ankaŭ mi povus vojaĝi per ĝi?”

Filipo entuziasmiĝas. “Jes, kompreneble. Kien vi volas iri? Aŭ, pli precize, al kiam?”

“Mi volus iri al Bulonjo-sur-Marco en 1905. Mi volas viziti la

Unuan Kongreson de Esperanto por aŭskulti la paroladon de Zamenhof.”

“Ĉu vi volas fari tuj? Ni reiru al mia ĉambro.”

“Sed ni ne havas tempon. Estas jam kvarono post la sesa, kaj la Teatra Vespero komenciĝos je la oka.”

“Tio ne estas problemo. Eĉ se ni forrestos kvin tagojn, ni povos reveni je precize ĉi tiu horo: je la sesa kaj dek kvin, la 30an de julio 1982.”

“Ne,” Lunjo diras firme. “Mi ne estas preta. Mi bezonas tempon por pensi pri ĉio ĉi.”

Filipeto ne insistas, kaj la duopo, tre penseme, reiras al la kongresejo.

La lasta programero

Sabatan matenon okazas la Solena Fermo. Filipino kaj Lunjo sidas kune, sed ili ne parolas inter si pri la tempomaŝino. Kaj eĉ ne estas tempo por pensi pri tio, ĉar la kongreso proksimiĝas al sia fino, kaj necesas diri “Ĝis la revido!” al ĉiuj novaj geamikoj.



“Kion ni faros?” Lunjo diras. “Nun vi devos reiri al Kembriĝo kaj mi al Rio. Kiam ni povos revidi unu la alian?”

“Tio ne estos problemo,” Filipino trankviligas ŝin. “La tempo-

maŝino vojaĝas tra spaco, ne nur tra tempo. Mi facile povos veni viziti vin en Rio.”

“Ho jes, via tempomaŝino. Mi forgesis pri tio.”

Filipeto komprenas, ke la afero ankoraŭ maltrankviligas ŝin.

“La libroservo ankoraŭ estas malfermita,” Lunjo diras. “Tio estas la lasta ero de la kongresa programo. Ĉu ni iru rigardi?”

Estas amaso da homoj en la libroservo, kiam ili alvenas. Estas longa vico ĉe la kaso, ĉar ĉiuj kunpuŝiĝas por lastminute aĉeti la malmultajn librojn, kiuj restas. Filipino kaj Lunjo vagas inter la tabloj, legante la titolojn, de tempo al tempo foliumante libron, serĉante ion por aĉeti. Filipeto trarigardas japanan bildstrian libron *Nudpieda Gen*, dum Lunjo foliumas tradukon de la sonetoj de Ŝekspiro.

“Tio estas nova titolo,” ŝi diras.

Tiam ŝi rigardas la prezon en la interna kovrilo kaj seniluziiĝas. “680 frankojn ĝi kostas! Mi volegus aĉeti ĝin, sed ĝi estas tro multekosta.”

Tio donas al Filipino bonan ideon. Sed li diras nenion al Lunjo.

Ili eliras el la libroservo.

Lunjo diras, “Ĉu vi atendos momenteton?” Ŝi gestas al la direkto de la virina necesejo.

Filipo rigardas dum ŝi transiras la halon, tiam tuj rapidas reen en la libroservon. Li iras rekte al la tablo, kie kuŝas la libro, kiun Lunjo deziras. Sed ho ve! virino staras apud la tablo kaj tenas la lastan ekzempleron en sia mano. Ŝi malrapide turnas la paĝojn kaj legas la sonetojn. Filipeto rigardas ŝin streĉe. Ĉu ŝi remetos la libron, aŭ ĉu ŝi prenos ĝin kaj iros pagi ĉe la

kaso? Ŝi denove foliumas la paĝojn, tiam finfine turnas al la interna kovrilo por rigardi la prezon. Tio sufiĉas. Ŝi remetas la libron sur la tablon kaj foriras.

Filipeto tuj kuras al la tablo kaj kaptas la lastan ekzempleron. La libro estas multekosta, sed tio ne gravas. Li portas ĝin al la kaso kaj pagas.



Li volas skribi dediĉon antaŭ ol donaci la libron al Lunjo. Li elprenas sian skribilon kaj pensas. Kaj tiam, starante meze de la libroservo kun globkrajono enmane, subite li memoras, kie li jam vidis tiun ĉi libron. Ĝi estas la sama, kiun li trovis en la antikvejo de la estonteco. En tiu libro estis dediĉo de li mem al Lunjo. Kiuj estis la vortoj de la dediĉo? Filipino streĉas sian memoron, sed ne povas rekapti la precizajn vortojn.

Ne gravas. Filipeto prenas sian globkrajonon kaj skribas:

“Al Lunjo post memorinda semajno. Kun bondezirojn”

Li atingas tiun punkton kaj haltas. Li ĵus memoris ion. Ĉu Filipigo ne diris al li, ke estas gramatika eraro en tiu frazo? Post *kun* oni neniam aldonas akuzativon. Sed estas tro malfrue: li jam skribis la frazon per globkrajono, kaj ne eblas korekti ĝin.



Kaj nun trafas lin terura penso. Eĉ se li povus, li nepre ne devas korekti tiun frazon! Ŝanĝi ion ajn estus ekstreme danĝere. Tio signifus ŝanĝi okazaĵon en la estonteco; kaj se li ŝanĝus la estontecon, kio sekvus? Eble li ne estus trovinta tiun libron en la antikvejo de la estonteco, Heleno ne estus instruinta al li la teorion Nakamura pri tempo, ŝi ne estus helpinta lin konstrui

la tempomaŝinon, Filipego ne estus konsilinta lin renkonti Lunjon ĉe la haltejo... Sed eĉ tio ne estas la plej grava afero. Pli ol ĉio alia, li ne volas fari ion ajn, kiu povus endanĝerigi la estontan ekzistadon de Heleno.

Ne gravas pri la troa akuzativo. Li prenas sian globkrajonon, kaj per senzorga gesto li subskribas:

“Filipo Nakamura. Antverpeno, en julio 1982.”

La reta versio de la rakonto kun tradukoj al multaj lingvoj
kaj aldonaj materialoj, sondosieroj kaj multaj ekzercoj
troviĝas ĉe **www.lernu.net**

La informoj pri la libro kun klarigoj pri tio, kiel aĉeti ĝin,
troviĝas ĉe **<https://lernu.net/libro>**



Esperanto?

www.lernu.net

Multlingva paĝaro por lernado
de la internacia lingvo Esperanto.